WIKIPEDIA

Malta lingvo

La **malta lingvo** (malte: *Malti*) estas la sola nacia lingvo de Malto, kaj unu el ties du oficialaj lingvoj (la dua estas la Angla). Lingvistoj klasifikas la lingvon kiel mikslingvon[2][3] aŭ semidan lingvon, sed ankaŭ malofte nomas ĝin "kreola".[4][5] Mankas interkonsento, kaj ofte ĝi estas rigardata kiel intera la aliaj klasifikoj.[3][6][4] La malta bazitas sur la sicilia araba, sed releksigoniga de la Itala kaj Sicilia, kaj pli lastatempe de la Angla. Preskaŭ 50% de la malta leksiko venas el la itala kaj sicilia lingvoj kaj 20% el la angla. Ĝi estas parolata ĉefe en Malto sed kun malgrandaj komunumoj en Aŭstralio, Kanado, Ĝibraltaro, Italio, Britio kaj Usono.[1] Ĝi estas la sola semida lingvo en la Eŭropa Unio kaj la sola semida lingvo, kiu uzas la latinan skribon.

En lokaj nomoj parte troviĝas fenicaj resp. punikaj vortoj.

Malta	
Malti	
Parolata en	Malto (lando) Aŭstralio Kanado Ĝibraltaro Italio Britio Usono [1]
Parolantoj	482 880
Denaskaj parolantoj	proksimume 380 000
Skribo	latina alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Mikslingvo, Semida lingvo, aŭ Kreola lingvo	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Malto Eŭropa Unio
Reguligita de	Nacia Konsilio por la Malta Lingvo
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	mt
ISO 639-2	mlt
ISO 639-3	mlt
Glottolog	malt1254
Angla nomo	Maltese
Franca nomo	maltais
Vikipedio	

Enhavo

Fonologio
- Konsonantoj
- Vokaloj

Skribo
- Maltaj verkistoj
- Alfabeto
- Ekzemplo

Estonteco
- Morto
- Ŝanĝoj en miksaĵo de la angla kaj itala
- Literumo

Literaturo

Vidu ankaŭ

Eksteraj ligiloj

Notoj kaj referencoj

Fonologio

Konsonantoj

Konsonantoj de malta[7]

		Bilabialo	Labial-dentalo	Dentalo	Postalveolaro	Velaro	Faringalo	Glotalo
Naza		m		n				
Plozivo	senvoĉa	p		t		k		ʔ
	voĉa	b		d		g		
Frikativo	senvoĉa		f	s	ʃ		ħ	
	voĉa		v	z				
Afrikato	senvoĉa			t͡s	t͡ʃ			
	voĉa			d͡z	d͡ʒ			
Trilo				r				
Alproksimanto				l				

Vokaloj

Vokaloj de malta[7]

	Fronta	Malfronta
Ferma	i	u
Mezo	e	o
Malferma	a	

Skribo

Ĝis la 18-a jarcento la malta restis lingvo parolata kaj ne skribata; la kleruloj uzis la sicilian lingvon por siaj skriboj, kaj la maltaj nomoj aperas en ĉi tiuj verkoj per hazardaj transskriboj. Koniĝas neniu malta teksto per araba skribado kiu devenas de antaŭ la 15-a jarcento.

Pietru Caxaro (ĉ. 1400 – 1485) estis la unua konata filozofo el Malto, fragmentoj el kies verkoj ankoraŭ ekzistas. En liaj verkoj estas tre aŭtenta ekzemplo de malta lingvo, kiu tiam havis pliajn arabdevenajn vortojn ol nuntempe.

La unua klerulo kiu interesiĝis pri la skribado de la malta lingvo estis Gian Pietro Francesco Agius de Soldanis, kiu eldonis en 1750 du librojn, *Descrizione della Lingua Punica* kaj *Nuova Scuola di Grammatica*. Li kredis erare ke la malta devenis de la punika (lingvo ankoraŭ preskaŭ tute nekonata). Li proponis ke unu grafemo reprezentu unu fonemon: a, b, c (por ċ hodiaŭ), d, e, f, gk (por g), g (por ġ), ch (por ħ), i, j, k, l, m, n, o, p, k (por q), r, s, t, u, v, sc (por x), z. Dom Frangisk Wizzino skribis en 1752 la libron *Tagħlim Nisrani*, duone en la malta, duone en la itala. Ne evidentas, ĉu li konis la verkon de Soldanis, sed li uzis nekonforman sistemon: a, b, ce/ci (por ċ hodiaŭ), ka/ko/ku (por k), d, e, f, ge/gi (por ġ), ga/go/gu (por g), hh (por ħ), i, j, k (por q), l, m, n, o, p, r, s, sch (por sk), t, u, v, w, sc (por x), z.

Ĉe la fino de la 18-a jarcento, la patriotisma Mikiel Anton Vassalli (poste nomita "la patro de la lingvo malta") studis la parolmanieron de la loĝantaro de Żebbuġ (sia naskoloko), ĉar li kredis ke ĝi estis la "plej pura" malta. Lia sistemo ŝanĝiĝis de libro al libro, komenciĝante en *Alfabeto Maltese* (1788) kaj *Alfabett Malti Mfisser bil-Malti u bit-Taljan* (1790–1), daŭrante en *Lexikon* (1796), kaj finiĝante en *Grammatica della Lingua Maltese di Michelantonio Vassalli* (1827). Li pruntepreniis literojn el la greka, la rusa, kaj la araba. Ekde 1822, Gużeppi Martin Cannolo, de La-Valeto, faris multajn tradukojn, per kiuj li enkondukis la

literon *ħ*. Kaj ekde 1824, Francis Vella eldonis plurajn verkojn pri la malta lingvo, kun ŝanĝiĝantaj alfabetoj, kaj batalis kontraŭ George Percy Badger, la redaktisto de la unua maltlingva gazeto. La afero estis la politikaj implicoj malantaŭ la influo de la itala kaj la malta en la malta skribado.

Simila batalado pri la malta alfabeto, inter pluraj kleruloj, daŭris ĝis la 1-a de januaro 1934, kiam la brita kolonia regado finfine eldonis la modernan alfabeton.

Maltaj verkistoj

- Ġorġ Pisani (1909-1999) estis verkisto el Malto konsiderita unu el la plej elstaraj de tiuj lando kaj lingvo.

Alfabeto

Litero	Nomo	Maltlingva ekzemplo	IFA	Proksimuma Esperantlingva sono
A a	a	anġlu (anĝelo)	a	a
B b	be	ballun (pilko)	b	b
Ċ ċ	ċe	ċavetta (kerna)	tʃ	ĉ
D d	de	dar (hejmo)	d	d
E e	e	envelopp (koverto)	e	e
F f	effe	fjura (floro)	f	f
Ġ ġ	ġe	ġelat (glaciaĵo)	dʒ	ĝ
G g	ge	gallettina (biskvito)	g	g
GĦ għ	ajn	għasfur (birdo)	ˤ:, ħ:	(silenta, sed longigas la antaŭan vokalon)
H h	akka	hu (li)		(silenta)
Ħ ħ	ħe	ħanut (butiko)	ħ	h
I i	i	ikel (manĝaĵo)	i	i
IE ie	ie	ieqaf (halto)	iɛ, i:	je, i
J j	je	nazzjonali (nacia)	j	j
K k	ke	kelb (hundo)	k	k
L l	elle	libsa (robo)	l	l
M m	emme	mara (virino)	m	m
N n	enne	nanna (avinjo)	n	n
O o	o	ors (urso)	o	o
P p	pe	paġna (paĝo)	p	p
Q q	qe	qattus (kato)	ʔ	-
R r	erre	reġina (reĝino)	r	r
S s	esse	salib (kruco)	s	s
T t	te	tieqa (fenestro)	t	t
U u	u	uviera (ovingo)	u	u
V v	ve	vjola (viola)	v	v
W w	we	widna (orelo)	w	ŭ
X x	exxe	xadina (makako)	ʃ / ʒ	ŝ, ĵ
Z z	ze	zalza (saŭco)	ts / dz	c, dz
Ż ż	że	żarbun (ŝuoj)	z	z

Ekzemplo

De la Eŭropa Konstitucio:

Angla	Malta
The Union is founded on the values of respect for human dignity, freedom, democracy, equality, the rule of law and respect for human rights, including the rights of persons belonging to minorities. These values are common to the Member States in a society in which pluralism, non-discrimination, tolerance, justice, solidarity and equality between women and men prevail.	L-Unjoni hija mibnija fuq il-valuri ta' rispett għad-dinjità tal-bniedem, ta' libertà, ta' demokrazija, ta' ugwaljanza, ta' l-istat tad-dritt u tar-rispett għad-drittijiet tal-bniedem, inklużi d-drittijiet ta' persuni li jagħmlu parti minn minoranzi. Dawn il-valuri huma komuni għall-Istati Membri f'soċjetà karatterizzata mill-pluraliżmu, in-non-diskriminazzjoni, it-tolleranza, il-ġustizzja, is-solidarjetà u l-ugwaljanza bejn in-nisa u l-irġiel.

Estonteco

Lingvistoj konjektas pri kelkaj estontecaj efikoj je la malta lingvo. La norma malta pli kaj pli anstataŭas la dialektojn de la lingvo.

Morto

Lingvoanstataŭado al la angla komenciĝis,[8] kaj kelkaj argumentas, ke la malta similus al lingvoj kiel la irlanda, kiu estis anstataŭita en sia hejma lando de la Angla lingvo.[9] Se la tendenco daŭras, la malta povas fine fariĝi superflua apud la angla.

Ŝanĝoj en miksaĵo de la angla kaj itala

La tendenco en Malto estas, ke tie la angla kaj itala lingvoj havas pli da influo.[8] Ĉiam pli da maltanoj instruas al siaj infanoj la anglan kiel unuan lingvon kaj la edukada sistemo preferas la anglan. Ankaŭ la nombro de tiuj, kiuj povas paroli la italan lingvon kreskas pro la amaskomunikiloj.

Se la lingvo prenas novajn anglajn vortojn, ĝi ofte italecigas ilin. Ekzemple la vortoj "evaluation", "industrial action" kaj "chemical armaments" fariĝas "evalwazzjoni", "azzjoni industrjali" kaj "armamenti kemikali".[10]

Ĉi tiuj influoj signifas, ke se la malta lingvo transvivus, ĝi transvivus kiel pli granda mikso de angla kaj itala lingvoj.[9]

Literumo

La amaskomunikiloj havas grandan influon sur Malto. Plej ricevebla amaskomunikilaro estas en la angla aŭ itala lingvoj. Ankaŭ interreta uzo en la malta estas tre limigita, sekve ĝi ofte ne servas al la lingvo. Sekve, kiam oni tajpas, 'c' estas uzata anstataŭ 'ċ', kaj 'h' anstataŭ 'ħ'. "z" estas skribata "tz" por distingi ĝin de "ż", kiu estas skribata "z", kaj "ġ" estas skribata "dj" por distingi ĝin de "g".

Literaturo

- *Monato*, internacia magazino sendependa, numero 2000/08, paĝo 16: *La malta lingvo* verkita de Carmel Mallia.

Vidu ankaŭ

- Sicilia lingvo
- Sicilia araba dialekto

Eksteraj ligiloj

- http://www.kunsilltalmalti.gov.mt
- http://www.ghaqdatalmalti.org
- http://www.akkademjatalmalti.com Akademio de lando Malto
- http://mt.wikipedia.org Ĉefpaĝo de la malta Vikipedio

Notoj kaj referencoj

1. ↑ 1,0 1,1 Ethnologue entry for Maltese (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=mlt)
2. ↑ [1] (http://www6.gencat.net/llengcat/noves/hm04primavera-estiu/docs/a_badia.pdf)
3. ↑ 3,0 3,1 Stolz, T. (2003) Not quite the right mixture: Chamorro and Malti as candidates for the status of mixed language, in Y. Matras/P. Bakker (eds.) The mixed languages debate. Theoretical and empirical advances. Berlin: Mouton de Gruyter, pp. 271-315. P. 273
4. ↑ 4,0 4,1 Mori, Laura. The shaping of Maltese along the centuries: linguistic evidences from a diachronic-typological analysis. Conference "Maltese Linguistics / Lingwistika Maltija"; Universität Bremen; 18th-20th October 2007 (http://www.fb10.uni-bremen.de/maltese/abstracts.aspx); retrieved Jul 2008
5. ↑ [2] (http://books.google.com/books?id=0J2VOzNYtKQC&pg=PA84&lpg=PA84&dq=Maltese+is+creole&source=web&ots=DUeGGtXand&sig=ik1fCj7vMRVbhE9cZ4DWLyx2ZgI&hl=en&sa=X&oi=book_result&resnum=1&ct=result)
6. ↑ Meakins, Felicity. 2004. Review of "The Mixed Language Debate: Theoretical and Empirical Advances." Linguist List.[3] (http://linguistlist.org/pubs/reviews/get-review.cfm?SubID=38198)
7. ↑ 7,0 7,1 Hume (1996:165)
8. ↑ 8,0 8,1 Ignasi Badia i Capdevila; A view of the linguistic situation in Malta (http://www6.gencat.net/llengcat/noves/hm04primavera-estiu/a_badia2_3.htm); NovesSl; [2004]; retrieved on [2008-02-24]
9. ↑ 9,0 9,1 http://www.gaelport.com/index.php?page=clippings&id=366&viewby=date
10. ↑ [4] (http://www.macmillandictionary.com/MED-magazine/February2005/27-LI-Maltese.htm)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Malta_lingvo&oldid=6579064"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 15:42, 16 apr. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.